



4

# BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA  
ESPERANTISTA ASOCIO

APRIL O 1963

# ENHAVO

|                                                                  | Paĝo |
|------------------------------------------------------------------|------|
| * * * Al firma financa disciplino . . . . .                      | 1    |
| * * * 48-a Universala Kongreso de Esperanto . . . . .            | 2    |
| * * * 19-a Kongreso de TEJO en Vraca . . . . .                   | 4    |
| Atanas D. Atanasov — ADA. Dekkvina kaj dekseka lecionoj .        | 5    |
| Violin Oljanov. Ni ne misuzu la vortfareblecon . . . . .         | 9    |
| Ilija Petrov. Notoj pri la lernolibro de Sarafov-Ĥesapĉiev . . . | 10   |
| Anton Vasev. Pri la lernolibro de Sarafov-Ĥesapĉiev . . . . .    | 12   |
| ORGANIZA VIVO                                                    | 12   |
| TRA LA GAZETARO                                                  | 13   |
| * * * Fonduso Centra Esperanto—Domo . . . . .                    | 14   |
| AMUZA PAĜO                                                       | 15   |
| * * * Por la Monto-Domo „Esperanto“ . . . . .                    | 16   |

*Abonkotizo : jara — 1,4 levoj, duonjara — 0,7 lv. Por eksterlando — 2lv  
2 rubloj, 2 dolaroj aŭ egalvaloro; por Albanio, ĈSSR, Hungario, Jugoslavio,  
Pollando kaj Rumanio — 1,6 lv.*

*Reklamtarifo : 0,15 levoj por cm<sup>2</sup>; korespondanoncoj : 5 stotinkoj por ĉiu  
vorto. Eksterlandaj adresoj publikigataj senpage. Ekstera kovrilpaĝo — 60 lv.*

## LANDAJ PERANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“

**ALBANIO :** Ing. Cefo Fico, 44 Rruga Stafa, Tirane.

**ITALIO :** Julia Franceschi, via A. Boito 6, Padova

**KOREO :** Korea Esp. Asocio. Pjeng' jang P. O. kesto 16.

**NEDERLANDO :** Ru Bossong, Floraplein 23 Eindhoven.

**RUMANIO :** Mihail Popescu, Cal. 13 Septembrie 65, București 5

**SOVETUNIO :** Ivan Palkin, Mitnaja ul 52/54 kv. 19, Moskva, B—162

**SVEDIO :** Karl Kvist, Deje, Box 109—a.



## AL FIRMA FINANCA DISCIPLINO

Ne estas necese konvinki onin, ke la asocio ne povus regule funkcii sen sufiĉa alfluo de monrimedoj. De tio dependas ĝis alta grado la organiza stato de la asocio kaj ĝia propaganda, kulturkleriga kaj internacia agado. La fundamentaj elspezoj devenas el membro-kotizo, abonoj, vendaĵoj. Jen pro kio la societoj devas kun granda zorgemo rilati pri siaj ŝuldoj al la asocia kaso. Kun kontento ni konstatas, ke multaj societoj bone plenumas tiun sian devon kaj helpas multe la Centran Komitaton en ties laboro. Sed bedaŭrinde ekzistas ankaŭ tiaj societoj, kiuj neglektas eĉ sian fundamentan devon — sendi la kvoton de la membro-kotizo por siaj membroj. Delonge jam pasis la templimo por pago de la membro-kotizo por la unua monatario, alproksimiĝas la templimo por la dua monatario, sed ekzistas ankoraŭ ne malmulte da societoj, kiuj nenian kotizon sendis al la asocio por tiu ĉi jaro. Estas eĉ kelkaj societoj, kiuj ne elŝuldigis la membro-kotizon por la pasinta jaro. Kaj tio ja okazas en tia historia jaro, kiam unuan fojon en nia lando okazos universala Esperanto-kongreso! Ĉu ne hontas tiuj estraroj? Ĉiuj societaj estraroj, kiuj estimas sin, devas postsekvi la iniciaton de la Sofia societo „M. Gorkij“ kaj pagi la kotizon al la asocio honore al la 48-a Universala Kongreso de Esperanto por la tuta jaro antaŭ la okazigo de tiu ĉi kongreso. Tio estas honora tasko de ĉiuj kasistoj, de ĉiuj estraroj kaj aktivuloj, de ĉiuj membroj de nia asocio. Ni publikigos la nomojn de tiuj societoj, kiuj ĝis la 10-a de junio plenumis tiun noblan laboron, ankaŭ la nomojn de apartaj aktivuloj, kiuj montris bonegan agadon tiurilate. Sed en la sama julia numero ni publikigos malhonoran tabulon kun la nomoj de tiuj societoj, kiuj ne pagis la kotizon almenaŭ por la unua jarduono.

Pluraj estraroj kaj apartaj membroj tenas ĉe si sumojn de la markoj-brikoj. Tio ja estas krimo al nia asocio. Oni tuj devas sendi la kolektitajn sumojn al la bankkonto en la Sofia Investa Banko.

Iuj kamaradoj mendas diversajn aĵojn de la asocio ne pagante. Ni ankoraŭfoje memorigas, ke la financaj organoj ne permesas al ni vendi kion ajn en kredito. Jen pro kio ni ne povas plenumi tiajn mendojn, malgraŭ nia deziro komplezi.

Per financa disciplino, ni ĝenerale stabiligos kaj plifortigos nian asocion.



UNIVERSALA

48

KONGRESO

DE ESPERANTO

**Internacia Ekzameno.** La Internacia Ekzamena Komisiono denove ekzamenos en Sofio. Skriba parto de la ekzameno: posttagmeze, la 1-an de aŭgusto; parola parto, la 2-an de aŭgusto.

Al la ekzameno povas esti allasita nur persono, kiu sukcese plenumis abiturientan ekzamenon kaj kiu plene posedas la Internacian Lingvon. Ĉiu persono, kiu deziras kandidatiĝi, bonvolu sendi, kiel eble plej frue (limdato la 1-an de majo) al la sekretario de I. E. K.: esperantlingvan tradukon de la diplomo pruvanta, ke la kandidato plenumis abiturientan ekzamenon (la ĝusteco de la traduko devas esti konfirmita de kompetenta instanco) kaj ateston pri sukcese plenumita supera ekzameno de Esperanto en sia lando, aŭ alian pruvon pri plena posedo de la lingvo.

La kotizo por la ekzameno estas du usonaj dolaroj aŭ ekvivalento kaj devas esti pagita samtempe. La sekretario konsentas ĉi-jare akcepti „stelojn“ de UL (30) aŭ int. respondkuponojn (25), sed tio ne estas liganta precedenco. Kandidato, kiu pro registaraj reguloj absolute ne povas antaŭpagi la kotizon, sed kiu vere atendas ĉeesti la Kongreson, konsultu la sekreterion, kiu konsideros la eblecon de speciala aranĝo.

Akceptitaj kandidatoj ricevos specimenaĵajn demandarojn kaj pli detalajn informojn.

Laŭ la Regularo de IEK, sukceso en la ekzameno devas „atesti, surbaze de rigora ekzameno, la kapablon instrui Esperanton je supera nivelo“. Kandidatoj do atendu ekzamenon, kies kriterioj similas tiujn por universitata diplomo.

Sekreterio: F.ino Marjorie Boulton, 1 Inglefield Avenue, High Lane, Burslem, Stoke-on-Trent, Staffs., Anglujo.

Enketantoj bonvolu sendi int. respondkuponon.

**Konkurso pri deklamado.** Rajtas partopreni en tiu ĉi konkurso ĉiu aliĝinto al la 48-a U. K. Por la unuaj gajnintoj estas antaŭviditaj premioj. Por ke tiu ĉi konkurso havu kiel eble plej altan nivelon, la partoprenantoj devas antaŭe sendi al la konstanta adreso de la 48-a U. K. (ĉe UEA, Rotterdama) surbendigitan specimemon de sia deklammaniero. Surbaze de tiu, komisiono decidus pri la partopreno aŭ ne de la sinproponinto. La sonbendo estos redonita al la sendinto kontraŭ pago de la sendkostoj.

**Foto-Konkurso.** La temo de la Konkurso estas: „La Homo“. Rajtas partopreni la Konkurson ĉiu organizita esperantisto. La fotoj devas havi jenajn minimumajn formatojn: kategorio blanka-nigra 13×18 cm.; kategorio kolora 9×12 cm. Sur la dorsa flanko de ĉiu foto devas esti skribita la pseŭdonimo de la konkursanto. Aldone al la foto, en fermita koverto, devas esti sendita la kompleta nomo kaj adreso de la konkursanto kaj sur la koverto estu la sama pseŭdonimo, kiu troviĝas sur la dorsa flanko de la foto.

La ŝtata entrepreno „Bulgara Fotografio“ kaj la „Bulgara Fotoklubo“ kunlaboros en la organizado de la Konkurso. Premioj estas antaŭviditaj por la unuaj gajnintoj.

**Aliĝintoj** (ĝis 13/4/1963). Arabujo 1, Argentino 2, Aŭstralio 5, Aŭstrujo 31, Belgujo 39, Brazilo 2, Britujo 94, Bulgarujo 757, Ĉeĥoslovakujo 5, Danlando 62, Finnlando 45, Francujo 270, Germanujo (okc.) 98, Germanujo (or.) 38, Hispanujo 6, Hungarujo 96, Islando 2, Israelo 25, Italujo 151, Japanujo 5, Jugoslavio 41, Kanado 3, Madagaskaro 1, Meksikio 4, Monako 3, Nederlando 121, Nigerio 3, Norvegujo 12, Nov-Zelando 5, Pollando 291, Rumanujo 5, Sovetunio 47, Svedujo 144, Svisujo 21, Usono 10. Vjetnamio 1. Entute 2446 el 37 landoj.

## AL VI, INFANOJ — KONGRESANOJ !

(okaze de la 8-a Internacia Infana Kongreseto)

### Karaj geknaboj,

Proksimiĝas via 8-a Internacia Kongreseto. Nur post 3 monatoj vi estos gastoj de nia bela lando, kie sub la verda standardo kune kun la bulgaraj infanoj — esperantistoj vi faros malgrandan „rondon familian“ — rondeton de la plej junaj geesperantistoj en la mondo.

Gaja kaj varia estos via vivo dum la kongresa semajno. En agrabla amika medio vi povos per la internacia lingvo Esperanto interkompreniĝi kun la infanoj de diversaj landoj, kune ludadi kaj amuzi vin. Vi havos la eblecon interkonatiĝi kaj ekscii, ke ĉie en la mondo vivas infanoj, similaj al vi, kiuj havas la samajn interesojn, ĝojojn kaj revojn, kiel vi. Vi ekscios ankaŭ, ke ĉiuj homoj sur la tero, sendepende de naciaj, religiaj, haŭtkoloraj aŭ aliaj diferencoj, povas vivi en atmosfero de homamo kaj sincera amikeco.

Dum la kongresa semajno vi ricevos impresojn kaj konojn pri diversaj landoj kaj popoloj per senperaj rakontoj, naciaj kantoj kaj dancoj multe pli bone, ol tion donus al vi kia ajn lernado.

La bulgaraj geesperantistoj, speciale la bulgaraj infanoj-esperantistoj, ĝoje atendas vian alvenon. Oni faras ĉion necesan por kontentigi vin. Vi disponos bone aranĝitan loĝejon, kie en higienaj ĉambroj vi havos vian noktan kaj posttagmezan ripozon. En la ĉarma parko de la „Palaco de la junpioniroj“, meze de la belaj, bonodoraj floroj, ĉarmaj aleoj, bonaj ludejoj vi povos laŭvole ludadi kaj vin amuzadi. Sur la scenejo de la junpionira somera teatro vi plenumos laŭvole diversajn programerojn — kantojn, deklamojn, dancojn k. a. Vin atendas interesa ekskurso al la „Vitoŝa-monto“, kie vi povos kuradi sur la montaj herbejoj, ĝui buntajn florojn, kunkanti kun la birdoj kaj la fontetoj.

Ĉio ĉirkaŭ vi estos tiel freŝa kaj verda kiel freŝa kaj verda estas la esperanta ideo, kiun vi portas en viaj infanaj koroj — la ideo pri homamo, amikeco kaj eterna paco inter la popoloj.

La detala kongreseta programo estos anoncita poste.

Karaj infanoj — geesperantistoj, la tempo rapide kuras, la lasta limdato por aliĝi — la 30-a de junio 1963 estas proksima. Ne prokrastu vian aliĝon kaj vivu kun ĝojo pri via antaŭstaranta esperanta festo!

**Radka Rajnova**

(membro de LKK — Infana Kongreseto)

## JUNULARO SUR POSTENO

### LA KONGRESA KOMITATO INFORMAS



La Kongresan Komitaton atingis la unuaj reeĥoj de la informado antaŭ neesperantistaj junularaj organizaĵoj. „The library of kongress, Washington“ deziras publikigi informojn pri la kongreso. La Monda Federacio de la Demokrata Junularo en Budapeŝto kaj „International union of students in Praha“ tre verŝajne sendos observantojn.

Por la Oratora konkurso en Vraca estis fiksitaj jenaj temoj:

- 1) Kiel mi konceptas la mondon en 2000 jaro?
- 2) Kiel arto povas kontribui al paco?
- 3) Kion fari por ne vane ellerni Esperanton?
- 4) Ĉu estas Esperanto por mi vera funkcia rimedo por internaciaj kontaktoj?

La KK invitis la konatan esploriston kaj mondvojaĝanton Tibor Sekelj prelegi dum la kongreso en Vraca pri sia lasta esplorvojaĝo tra Afriko, ĉefe runde de la „Karavano de la Amikeco“.

Okaze de la Junulara Jaro kaj la kongreso en Vraca la KK eldonis belegan glumarkon, kiu estas vendata je eksterordinare malalta prezo (0,10 lv. por unu folio de 10 pecoj). Mendu tuj grandan kvanton ĉe la KK (Junulara kongreso, Sofia, p. k. 587). Antaŭpaga la menditajn glumarkojn al la konto de la KK: № 15/1886 en DSK — Sofia, Blagoevski rajon. Ĉe ĉiu mendo aldonu neuzitajn poŝtmarkojn de 0,05 lv. por poŝtelspezoj.

Por la kulturaj programoj de la kongreso anoncis sin junulara kanthoro el Ljubljana kaj teatra grupo de Studenta Esperanto-Klubo en Zagreb, kiu preparas la teatraĵon „Mondmilito“ de Branislav Nuŝiĉ. Programon preparas ankaŭ la Studenta grupo en Ruse kaj aliaj.

**Statistiko.** Ĝis la 19-a de apr. 1963 aliĝis 220 gejunuloj el 14 landoj. La Kongresan Bultenon kaj aliĝilon petis pluraj gejunuloj el: Britio, Danlando, Ĉeĥoslovakio, Izraelo, Francio, Germanio (okc.), Japanio, Jugoslavio, Sovetunio, Skotlando kaj Svedio.

## ESPERANTISTA KUNVENO

Dekkvinia leciono

Ĝis antaŭ nelonge nia kursgvidanto nomis nin „gekamaradoj“, lastatempe li jam komencis nin nomi „gesamideanoj“. Li konsideras nin jam sufiĉe preparitaj por partopreni la vivon de la esperantistoj kaj, kiel dirite, li kondukis la tutan klason al kunveno de la loka Esperanto-societo.

Alveninte ni trovis la kunvenejon plena je esperantistoj.

En la komenco ni estis iom timemaj inter la malnovaj kaj spertaj esperantistoj, kiuj renkontis nin kun granda simpatio kaj amikeco.

La prezidanto de la societo malfermis la kunvenon per kelkaj konvenaj vortoj kaj prezentis la novevenintojn al la malnovaj samideanoj.

— Kaj nun — daŭrigis li — ni elektu prezidanton por la hodiaŭa kunveno. Je la honoro de la freŝaj gesamideanoj mi proponas, ke ni elektu prezidanton el ili...

Ni ekrigardis nin surprizite kaj mirigite, apenaŭ komprenante tiun proponon. En tiu tempo la prezidanto interŝanĝis mallaŭte kelkajn vortojn kun nia kursgvidanto kaj — mi ankoraŭ ne sukcesis rekonsciigi de la unua surprizo, jen mi enfalis en novan: mi aŭdis mian nomon! La societa prezidanto proponis kaj oni elektis ĝuste min prezidanto de la kunveno!

Neniam ĝis nun mi havis okazon prezidi kunvenon. Kun ĝeno mi, kolektinte mian tutan kuragon, komencis miajn novajn funkciojn laŭ la tagordo, kiun oni donis al mi.

Unue la sekretario legis la protokolon de la pasinta kunveno.

Poste unu membro raportis pri la vizito, kiun li faris al la esperantistoj en alia urbo kiel sendito de la loka societo okaze de ilia jarfesto. Tie li ĝuis tre bonan akcepton kaj restis ravita de la tieaj esperantistoj.

La ĉeestantoj donis kelkajn demandojn al la raportinto.

Poste alia samideano tralegis interesan leteron de sia korespondantino el la Filipinaj insuloj.

En la fino li ekkantis mallaŭte kaj iom malkuraĝe la esperantistan himnon „La Espero“. Tuj ĉiuj aliĝis al la kanto ĥore kaj la ĉambro ekeis pro la fortaj voĉoj. Ni, la novaj esperantistoj, jam konis la tekston, sed ne ankoraŭ la melodion de la himno. Tamen la plimulto el ni komencis kunkanti.

Je la 21-a horo, meze de entuziasmaj aplaŭdoj, mi fermis la kunvenon — la unuan kunvenon, kiun mi prezidis en mia vivo!

### PROVERBOJ

Emirenta ŝuldanto — malbona paganto.

Mortinto panon ne bezonas, sed vivanto.

Mensogulo opinias ankaŭ la aliajn mensogantoj.

### PARTICIPOJ (en substantiva formo)

- anto = persono -anta, persono kiu -as.

- into = persono -inta, persono kiu -is.

- onto = tiu, kiu -os.

- ato = persono, kiun oni -as.

- ito = persono, kiun oni -is.

- oto = persono, kiun oni -os.

La legantoj de la jena libro. La verkinto de la libro. La abonantoj de la gazeto.

Kiu kantas estas kantanto; se li estas profesia kantanto, ni nomas lin kantisto.

Instruanto — instruisto.

Kreinto — tiu, kiu kreis.

Savonto — tiu, kiu savos.

La sendito de la esperantista societo alvenis.

Delegito. Deputito.

### OBJEKTA PREDIKATIVO

Oni elektis min prezidanto = oni elektis min esti (ke mi estu) prezidanto.

Mi trovis lin malgaja = mi trovis lin esti malgaja.

La malfeliĉo faris lin (esti) saĝa.

Mi vidis la maŝinon difektita = mi vidis, ke la maŝino estas difektita.

Mi vidis la maŝinon difektitan = mi vidis la difektitan maŝinon (la maŝinon kiu estis difektita, kiun oni difektis).

Mi opinias lin honesta homo (ke li estas honesta homo).

### EKZERCOJ

1. En la sekvantaj frazoj metu la senfinajn vortojn en konvenan particon :

La vizit... de la ekspozicio estis ravitaj de la elmetitaj pentraĵoj.

Knabo kiu lernas estas lern...

La parol... estis tre elokventa kaj la aŭskult... longe aplaudis post kiam li finis sian paroladon.

La ven... atendas en la antaŭĉambro.

Multaj aĉet... amasiĝas antaŭ la butikoj de nia najbaroj.

2. Kia estas la diferenco inter : kantisto — kantanto ; ŝtelisto — ŝtelanto ; muzikisto — muzikanto.

3. Mi sentas min san...

Li kredis vin honest...

Ŝi nomas lin onkl...

Li trovis ŝin mortint... Li trovis la mortintan kuŝant... en mizera ĉambreto.

4. Kiel vi povus esprimi alimaniere la kursive presitajn vortkompleksojn en la sekvantaj frazoj:

*En la komenco* n estis iom timemaj.

Ili renkontis nin *kun ĝojo*.

### MI RICEVIS LETERON EL EKSTERLANDO

Deksesa leciono

Memorinda restos la hodiaŭa tago en mia vivo. Mi ricevis respondon al mia letero. Ja tio estas la unua letero, kiun mi ricevas el eksterlando, el la vasta mondo. Kaj de kiu? — De samideano, de amiko — nevidita, sed amata. Ne estas priskribbla mia ĝojo.

Petersen skribas al mi pri si, pri sia profesio, pri siaj intereso, pri siaj hejmanoj, pri sia fianĉino. Jes, li estas fianĉo. Li estas 26-jara oficisto kaj laboras kiel librotenisto en kooperativo. La fianĉino estas lia koleginino kaj same esperantistino. Ambaŭ revas veturi al aliaj landoj, vidi aliajn homojn, aliajn morojn. Ilia revo estas la Proksima Oriento — speciale la Balkana duoninsulo, Ateno kaj Konstantinopolo laŭ ilin. Jes, vidindaj urboj ili estas. Sed — skribas Petersen — tio estas atingebla laŭ la disponebla tempo kaj... la disponebla mono. Ne tre facile solveblaj problemoj. Post la ricevo de mia letero Petersen kaj lia fianĉino enskribis en sian planon ankaŭ nian landon. Videble la esperantistojn povas altiri ne nur la antikvaj urboj, sed ankaŭ amikoj. Kaj ankaŭ en nia lando estas vidindaj regionoj, estas admirindaj montaroj kaj arbaroj...

Petersen ne preterlasas mencii ankaŭ pri la farendaj taskoj en lia ofico antaŭ la forveturo, pri la plenumendaj formalajoj por akiri pasportojn kaj vizojn... Pri ĉio pensas tiu amiko!

Mi sidas en mia ĉambro, relegas la leteron kaj dronas en feliĉa medito. Mi sentas jam la vivon de la esperantistaro, de tiu mirinda popolo, formita de bonvolaj homoj, de amikoj, dissemita vaste en la mondo, unuigita per unu lingvo kaj per unu ideo... Mi jam sentas min ne nur bulgaro — mi sentas min ankaŭ homo, ano de la homaro. Antaŭ du monatoj mi eĉ ne supozis kia beleco estas en tiu ĉi vivo. Kaj kiom rapide mi akiris la ŝlosilon de ĝia pordo! — Mi jam legas libere ĉiun esperantan tekston, preskaŭ ne uzante vortaron, mi korespondas kun malproksimaj amikoj, ili dividas kun mi siajn interesojn, zorgojn, dezirojn, revojn... Eble mi havos iun tagon la feliĉon atendi ĉe la stacidomo la alvenon de la vagonaro, kiu alportos al mi tiujn karajn amikojn.

Mi meditas kaj revas. Mi pensas pri tiu tempo, kiam la unua fajrero de la esperantismo estis ĵetita de D-ro Zamenhof kaj iom post iom ekbruligis la grandan fajron de la Esperanto-movado en la mondo.

Ekstere neĝas. Petolaj neĝeroj dancas gaje en la aero.

Mi ripetis la strofojn de nia himno:

*En la mondon venis nova sento...*

Jes! Ĝi venis kaj karesas ankaŭ min. Kaj

*Nia diligenta kolegaro  
en laboro paca ne laciĝos  
ĝis la bela sonĝo de l'homaro  
por eterna ben' efektivigos!*

## PROVERBOJ

Tuso kaj amo ne estas kaŝeblaj.

De majesta ĝis ridinda estas nur unu paŝo.

Maro estas gutaro.

Ei malgrandaj akveroj farigas grandaj riveroj.

De ŝafo senlana eĉ lanero sufiĉas.

## SUFIKSOJ

EBL — **kiu povas esti, -ata.**

Videbla = kiu povas esti vidata, kiun oni povas vidi.

Komprenebla, legebla, nepensebla.

Ebla=kiu povas esti, povas okazi. Tio ne estas ebla.

Eblo, ebleco: Mi ne havas eblon (eblecon) veni.

Eble: Al mi ne estas eble veni. Ĉu estas eble? Eble li venos, eble ne.

IND — **kiu meritas esti -ata.**

Vidinda loko=loko kiu meritas esti vidata, kiu meritas, ke oni vidu ĝin.

Leginda libro. Neirinkinda akvo.

Inda=meritanta. Vi estas inda por tiu honoro.

Indo, indeco=digno, digneco.

Inde: Ne estas inde kalumnii.

END — **kiu devas esti -ata.**

Skribenda letero=letero, kiu devas esti skribata, kiun oni devas skribi.

AR — **kolekto de samspecaj aĵoj, kiuj kune formas kompletan tuton.**

Vortaro=libro en kiu estas orde kolektitaj vortoj.

Vagonaro=multaj vagonoj, kiuj formas tuton (trajno).

Arbaro=multaj arboj, troviĝantaj sur unu spaco.

Homaro=ĉiuj homoj sur la tero.

Aro=kolekto, amaso. Aro da studentoj ne estas studentaro. (Rimarku, ke kiam **aro** estas uzata memstare, ĝi ne havas la signifon de tuteco de ĉiuj sed nur ian kvanton da samspecaj objektoj aŭ individuoj).

Aro da arboj. Areto da (de) esperantistoj atendis ĉe la stacidomo.

Are: ni marŝas are=ni marŝas grupe, en grupo.

Registaro — la reganta kolektivo de unu lando; ministraro.

ER — **konsista parteto el io.**

sablero = grajneto el sablo.

grenero = grenaj grajnoj.

panero = malgranda parteto de pano.

## EKZERCOJ

1. Formu paralelajn esprimojn kun la sufikso **ebi** al la sekvantaj frazoj:

*Mi aŭdis ŝian voĉon, sed ŝin mem*

*mi ne povis vidi.*

*... ŝi mem estis ...*

*Oni ne povas trinki tiun ĉi akvon.*

*Tiu ĉi akvo estas ...*

*Oni neniam povas trovi lin hejme.*

*Li neniam estas ... hejme.*

*Oni ne povas kompreni lian parolon.*

*Lia parolo estas ...*

2. Simile formu esprimojn kun la sufikso **ind**.

*Pro tiu ago vi meritas baton.*

*Vi estas ... pro tiu ago.*

*Tiu ĉi vino meritas esti trinkata,*

*do ĝi meritas ankaŭ esti aĉetata.*

*Tiu ĉi vino estas ... do ĝi estas an-*

*Mi dezirus forgesi ĉion, kio meritas esti forgesita, se oni povus ĝin forgesi.*

*kai ...*

*Mi dezirus ĉion ... se ĝi estas ...*

3. Same kun la sufikso **end**.

*Tio estas korespondadoj, kiujn mi devas klasigi.*

*Tio estas ... korespondadoj.*

*La propono devas esti diskutata. La propono estas ...*

4. Uzu la sufiksojn **ar** aŭ **er** laŭ la bezono en la sekvantaj frazoj:

*La bulgara student... faris viziton al la turka.*

*La laborist... bezonas komunan kaj facile lerneblan lingvon.*

*Granda fajro brulis en la korto; ni jetis en ĝin lign... fajr... ekflugis ĉirkaŭe en la aeron.*

*Nia vagon... flugis tra la kamparo.*

*Pro la arbo li ne vidis la arb... mem.*

## LINGVAJ DEMANDOJ

### NI NE MISUZU LA VORTFAREBLECON!

K-do Atanas Krumov el Plovdiv direktas al ni la jenajn demandojn:

„En la Esperanto-bulgara vortaro de At. Nikolov, eldonita en 1942 mi trovis du vortojn, kiuj enpensis min. Tiuj vortoj estas „ovorto“ kaj „evorto“, kiuj anstataŭas la vortojn „substantivo“ kaj „adverbo“. Tiuj vortoj tre plaĉis al mi, ĉar, laŭ mia opinio, ili estas faritaj entute en la spirito de Esperanto. En ili estas tre multe da logiko kaj simpleco. Ĉu ni ne povus uzi aliajn, simile faritajn vortojn, nome: „avorto“ „anstataŭ“ „adjektivo“, „iformo“ anst. „infinitivo“, „uformo“ anst. „imperativo“, „ostempo“ anst. „futuro“, „antaformo“, „itaformo“ ktp; „miformo“, anst. „unua persono“ „singularo de la verbo“, „ciformo“, „iliformo“ ktp. Ĉu oni povus uzi la vorton „nkazo“ anst. „akuza-tivo“? Ĉu ne estas tempo, ke ni forigu el Esperanto ĉiujn vortojn, kiuj nur malsimpligas la internacian lingvon? Ĉu havas ekzistrajton vortoj kiel substantivo, adjektivo, adverbo (kial ne alverbo), singularo, kondicionalo, infinitivo, prezenco, pluralo, pasivo, modo ktp?“

#### Respondo.

Unu el la fundamentaj principoj de Esperanto, kiu faras ĝin facila, internacia laŭ enhavo kaj alproksimigas ĝin al la naciaj lingvoj, estas la akcepto de ĉiuj vortoj kaj formoj, kiuj akiris internacian uzadon. Ja la pura artefariteco estis unu el la kaŭzoj pri la morto de Volapjuk. La internaciaj elementoj faras Esperanton vivanta lingvo, kun malstranga sonado. Jen pro kio Zamenhof kaj poste la Esperanta Akademio inter la aliaj internaciaj vortoj akceptis en Esperanto ankaŭ la gramatikajn terminojn kiaj substantivo, adjektivo, akuzativo, infinitivo, modo, pluralo, pasivo k. a. Ili estas konataj al multaj nacioj kaj estas trafe enkondukitaj en Esperanton.

Aliflanke Zamenhof kreis tre racian kaj regulan sistemon pri vortfarado kiu ege riĉigas la lingvon, kaj kapabligas ĝin esprimi ĉian nuancon de la penso.

Sed ni ne devas misuzi tiun ĉi eblecon, farante tre longajn kaj strangajn, malfacile kompreneblajn kunmetojn. Oni povus diri en iuj okazoj „o-vortoj“ (nepre kun streketo, ĉar alimaniere la vorto estus nekomprenebla) anstataŭ **Esperanta substantivo** aŭ la „i-formo“ de la Esperanta verbo anstataŭ **infinitivo de la Esperanta verbo** ktp. Sed malkompreneble ni ne povus uzi tiun ĉi kunmetaĵon, se ni parolus pri la substantivo ĝenerale aŭ pri substantivo de iu alia konkreta lingvo, ĉar en la aliaj lingvoj la substantivoj ne finiĝas per o, do ili ne estas „o-vortoj“. Malmalkompreneble ni ne povus uzi la kunmetaĵon „i-formo“, se ni parolus pri la infinitivo ĝenerale aŭ pri infinitivo de iu alia konkreta lingvo, ĉar en tiu okazo la infinitivo ne finiĝas per i. En la unua okazo ni uzas la akceptitan de ĉiuj oficialan kaj tre kompreneblan vorton „**substantivo**“, en la dua — „**infinitivo**“, kiu havas la samajn kvalitojn. Oni regule povus uzi la terminon „**ig-verboj**“, kio klare signifas **verbojn kun sufikso ig**; oni regule povus uzi „aŭ-vortoj“, kio signifas vortojn, finiĝantajn per la sonoj aŭ. Ja ni ne povus uzi pri ili alian gramatikan treminon, ĉar iuj el ili estas adverboj, aliaj — prepozicioj, triaj — konjunkcioj.

**Konkludo.** La Esperanta vortfarebleco estas tre elasta kaj prezentas nelimititajn eblecojn por pliriĉigo de la vortara trezoro. Tio ja estas granda avantaĝo de nia lingvo. Laŭprincipe ni povus fari ĉiajn vortkombinojn, kiuj havus ian logikan senceon. Sed se oni komencus misuzi kaj artifiĉi per tiu ebleco, fari strangajn kombinaĵojn, nekompreneblajn aŭ malfacile kompreneblajn por la amaso da ordinara esperantistoj, la avantaĝo transformiĝus en fuŝadon, en ludon de jonglistoj. Kontraŭe al la asertoj de k-do Krumov ĝuste tiaj kunmetaĵoj malfaciligas la lingvon. Tiaj artifaĵoj ne estas allasendaj en seriozaj tekstoj, kontraŭ ili ni devas batali.

Violin Oljanov

## NI RECENZAS

### NOTOJ PRI LA LERNOLIBRO DE SARAFOV — ĤESAPĈIEV — III ELDONO 1962

Ĉe la iom rapidema trarigardo de la lernolibro, kiun mi faris, okulfrapis min jenaj elementoj:

1. Pg. 12. Temas pri la transskribado de Ъ en Esperanton. La aŭtoroj asertas, ke la transskribado per ĉ, kiun oni rekomendas praktiki en la Bulgara ortografia vortaro, estas „absolute evitenda por Esperanto“. „En Esperanto oni povus uzi ĝin nur ĉe maloftaj kazoj kaj por specialaj celoj, ekzemple ĉe sciencaj esploroj fare de filologoj“. Kial? Oni ne klarigas. Certe oni opinias, ke ne estas necese kaj ĝustloke okupi onin per la kialoj kaj tial oni neniel aludas ilin (la kialojn).

Kaj mi timas, ke oni nenecese komplikigas la aferon. Tute ne malfaciligas la tute simpla transskribado per ĉ, kiun oni jam ne malofte praktikas, rimarkigante, ke ĉ sonas kiel ĵ en la angla vorto **sir** aŭ eĉ nenion rimarkigante. Ĉion ĉi la aŭtoroj faris supozeble por ne malfaciligi la eksterlandanojn, kvaŝaŭ ili multe klopodas por ne malfaciligi nin per siaj lingvaj apartaĵoj. Kaj tial ili (la aŭtoroj) por faciligi la aferon, rekomendas diversajn manierojn: a) transskribado per a (plej bone estus) — Dabovo, Ugarĉin, Aglen, Kazanlak: b) inter konsonantoj ĝi (Ъ) povas iĝi laŝata — Trnovo, Krgali, Krstnikov,

Krstanov, Petr, Dimitr; c) oni povas transskribi per **i** — Tirnovoj; per **u** — Gudev, per **e** — Krestanov. Kaj mi demandas: kiu starigis tiun praktikon? Kaj laŭ kiu principo? — Temas pri hazardaj solvmanieroj fare de homoj kiuj ne povas dikti regulon. Kaj grave, la ĉi-maniĝa diversa transskribado nur perdigas la ideon pri la sono kaj tute ne simpligas la aferon. La aŭtoroj mem komprenas tion kaj sur la sekvanta 13 paĝo, ne timante la evidentan malsinsekvon, skribis: „Aglen (Âglen), Dabovo (Dâbovo), Prvomaj (Pârvomaj)“. Por kiu iĝas donataj la interparentejaĵ klarigoj, revenigantaj al la **ъ=â**?

Konklude, la diskutata maniero estas nur superflua komplikigaĵo alla afero, do nefinpenaĵo.

Pĝ. 16, sube. „С наставката -in- се образуват имена на същества от женски пол.“ Oni donas neniajn ekzemplojn de -in- ĉe indiko de inaj bestoj. Ĉu eble oni malvalidigis ĝin (-in- ĉe bestoj)?!

La demando pri diferencigo de seksoj ĉe bestoj estas plue neglektata — kaj ne nur neglektata, sed tute malrekonata — sur p. 75 (en la mezo).

li — той } за лица  
 ŝi — тя }

ĝi — той, тя, то (за лица и животни)

La troigo de iuj aŭtoroj de gramatikoj (kaj la malsinsekvo de Z. mem en iuj punktoj koncerne la seksindikajn manierojn) tute ne signifas centprocentan forlason de li, lia, ŝi, ŝia ĉe bestoj. Kaj el la pritraktata lernolibro oni konkludas nome kaj nur kompletan forlason de tiu uzo, kiun (forlason) nenio povus pravigi — nek la esperanta, nek kiu ajn alilingva teorio kaj praktiko.

3. Pĝ. 23 (En la teksto „La kooperativa bazaro“). „Ili ambaŭ estas samklasanoj — te i duamata sa съкласници. La korekta uzo de „**ambaŭ**“ (ĉiam akceptata kaj ne influata de kro-

ma uzo de la germana **beide, beides**, do ĉiam — и двамата, и единият и другият) malpermesas la cititan esprimmanieron. Oni devus diri: Ili (la) du estas samklasanoj“. Kaj la citita frazo signifas, ke ili (ambaŭ) havas samklasanojn, tamen ili mem ne estas samklasanoj unu de la alia.

4. Pĝ. 45 („Leciono de aritmetiko“). En la esprimo „Inter ambaŭ nombroj...“ ni skribas la signon „...“. „Ambaŭ“ same estas erara — anst. „la du“.

5. Pĝ. 30 (en la mezo). „С тази ставка (ек — б. моя) се образуват глаголните форми, които отговарят на българското минало свърш. време. „**Si** ekbrulis pro envio“. Kaj mi rimarkigas (estante tute prava), ke oni povas diri tute korekte ankaŭ „**Si** ekbrulas pro envio“ kaj „**Si** ekbrulos pro envio“ ktp.

6. Pĝ. 40 („Grilo kaj formiko“). Pri la formiko estas dirite, ke „**ŝi**“ („**ŝi**“ estu konsiderata kiel personigaĵo, do permesata) batfermis la pordon.“ Mi dirus nepre „**frapfermis**“.

7. Pĝ. 55. Post „**apud**“. „Mi staras apud la fenestro“, anst. ... ĉe la fenestro. Evidente, la diferenco inter „apud“ kaj „ĉe“ ne estas komprenata. Oni ne lasu sin iĝi konfuzata per „Apud plena mangotablo ĉiu estas tre afabla“, ĉar „apud“ estas uzita anst. ... „ĉe“ por ritmeco.

8. Pĝ. 56, **malantaŭ** = **post**. Mi forte dubas. Ĉu oni rajtus diri ekzemple: „Malantaŭdu jaroj mi revenis?!“

9. Pĝ. 59, supre: „Venonte“ (anst. venante) al mi, li alportos al mi la libron.“ Tio signifas: „Li alportos al mi la libron kaj poste li venos al mi“. Temas pri nekredebla nekompreneo de la uzo de participio fare de la aŭtoroj. Jes, nekredebla!

10. „**Minacate** (anst. minacite) de la patro, la infano forlasis siajn petolaĵojn.“ Mi volus, ke ĉi tie estu preserve, tamen ne! Estas dirite, ke (minacate) estas ĉerashaŭne страдателно участие-наречие, kio, ĝi fakte estas.

Kaj kial „minacate“? Ĉu eb'le la minaco kaj la forlaso okazis samtempe, paralele? — Ne. La patro minacis la infanon kaj post la minaco mem la infano forlasis siajn petolaĵojn. Ja ankaŭ bulgarlingve oni ne rajtus diri: „заплашвано . . .“ Ree temas pri nekomprene de participa uzo, ĉifoje ne same drasta, tamen reala.

11. Pg. 68. „Vidvo edziĝis . . . kun“ (anst. al) „ties fratino“. La frazo de la

aŭtoroj signifas: „Той се ожени заедно с (когато се омъжи неговата (нейната) сестра.“

**Konkludo.** Mi ne havis eblon enprofundiĝi (ĉar mi devis baldaŭ redoni la lernolibron) en la metodikajn ecojn de la lernolibro. Kaj mi timas, ke enprofundiĝo vidigus pluajn difektojn. Kiel ajn ĝi estu, estas mirige, ke ĉiam ankoraŭ oni proponas al ni difektajn lernolibrojn.

Ilija Petrov, Popovo

## PRI LA LERNOLIBRO DE IVAN SARAFOV KAJ SIMEON HESAPĈIEV

Mi parolos, almenaŭ nun, pri tri demandoj: 1) la instrumentado 2) la konstruo de la leciono kaj 3) la senco de la citaĵoj.

1. La instrumentado estas miksitaj, tamen estas rekonite, ke la indukta metodo estas pli kaj pli rekomendata, kaj tial la procento de tiu metodo en la „miksaĵo“ devas esti klare kaj firme substrekitaj. Tio estas atingebla per riĉa bildigo de la lecionoj.

2. La konstruo de la leciono devas esti ordigita tiel, ke la gvidanto kaj la lernantoj, tuj post la titolo vidu klare kun kiuj gramatikaj kaj novaĵoj konatiĝos ili dum la leciono. Sekvas la tipaj ekzemploj — nur esperante, la klarigo de la nomoj per bildoj, la legaĵo, demandoj kaj nur traduko de mallonga teksto de bulgara lingvo en Esperanto.

— Kial nur teksto en Esperanto?

— Ĉar la traduko de esperanta teksto en bulgara lingvo estas en malkonsekvenco kun la indukta metodo.

3. La pensoj por Esperanto de eminentuloj estas utila propaganda rimedo, sed ne ĉiuj por ĉiam.

Ĝis kiam ni uzos citaĵojn, ke la lingvo ne estas „malviva“, post kiam de tiom da jaroj ĝi feliĉe vivas?

Ĉis kiam ni agitos, ke Esperanto estas „artefarita“, post kiam estas klare, ke la radikoj de la esperantaj vortoj ne estas laŭdezire elpensitaj, sed prenitaj „prunte“ el la vivaj lingvoj?

Per la konceptoj „morta“ kaj „artefarita“, tiel ofte ripetataj en la citaĵoj, ni multe ne kuraĝigus la lernantojn.

Jen pro kio ni devas elekti nur konvenajn citaĵojn laŭ la nuna stado de progreso de Esperanto.

Plej poste ni devas konfesi, ke al ni mankas ankoraŭ du specoj da lernolibroj: unu por la infanoj, kaj unu por homoj kun ne sufiĉa klereco, kiuj estas temoj por novaj du apartaj konversacioj.

Anton Vasev, Pernik

## ORGANIZA VIVO

**Tolbuĥin.** En la komenco de tiu ĉi lernaro la loka Esperanto-societo kune kun fako „Klerigo kaj kulturo“ ĉe la urba popola konsilantaro

dissendis specialajn leterojn al ĉiuj direktoroj de lernejoj petante ilian helpon pri organizo de kurso por kursgvidantoj — ĝinstrui-

stoj. Nun la kurso laboras sukcese. Konstante ĝin vizitas dek instruistoj.

En la urbo kaj en la proksimaj vilaĝoj Smolnica kaj Kara-Pelitt funkcias kelkaj kursoj por ĝelernantoj.

### S avô Ŝijakov

**Velingrad.** La Esp.-societo „Stojo Kalpazanov“ en Velingrad organizis sian jarkunvenon la 12-an de januaro 1963. En la korvene ornamita klubejo, krom pluraj societanoj ĉeestis ankaŭ k-do Kr. Karucin el la estraro de CK de BEA kaj k-do P. Arnaudov el Pazarĝik. Bone impresis la fakto, ke ĉi-jare la kunvenon partoprenis precipe ĝejunuloj, kiuj parolis pri la neceso rejniĝo de la societo. En atmosfero de kritikeco kaj memkritikeco, la kunveno pri-diskutis la pasintan kaj la estontan agadon de la societo. K-doj Karucin kaj Arnaudov ankaŭ grave kontribuis per valoraj rekomendoj. Estis decidite laŭtradicie organizi ankaŭ ĉi-jare, je la 26-a de junio la celebradon de la datreveno de Stojo Kalpazanov kaj Vela Peeva. Je la fino, laŭ iniciato de k-do Ĉolev oni kolektis pli ol 50 lv. por la finkonstruo de la esperantista montodomo en Vitoŝa. K-do Godev sola donacis 25 lv.

### Manol Ĉolev

**Mihajlovgrad.** La 18-an de januaro 1963 la konata esperantisto el Vraca — Radoslav Tričkov vizitis nian urbon kaj prelegis en 4 lernejoj antaŭ proksimume 1300 ĝeŭskultantoj pri la temo: „Esperanto — lingvo de paco kaj amikeco inter la popoloj“. La lernantoj renkontis liajn prelegojn kun granda intereso. En la vespero li parolis ankaŭ antaŭ la instruista kolegio en la ekonomia lernejo. Estis neforge-seblaj renkontiĝoj!

### Asen Pentov, instruisto

La 13-an de januaro 1963 en urbo Kazanlâk kolektiĝis je distrikta konferenco reprezentantoj de la Esperanto-societoj el la distrikto de Stara Zagora, reprezentantoj de la societo en Nova Zagora kaj de v. Korten.

Oni aŭskultis informojn pri la decidoj de la plenkunsido de CK de BEA okazinta en Sofio la 15-an de dec. 1962 kaj pri la organiza stato de ĉiuj Esperanto-societoj en la distrikto. Estis akceptita konkreta plano pri la agado de la societoj en la distrikto dum 1963. Ĝi antaŭvidas organizon de distrikta konferenco dum majo, patronecon de la societoj en St. Zagora, Kazanlâk kaj Ĝirpan al societoj en la vilaĝoj, varbadon en la proksimaj vilaĝoj, interŝanĝon de sperto inter la societoj kaj tute specialan atenton al la agado inter la junularo kaj lernantoj kaj klopodojn por plialtigo de la lingva nivelo de la esperantistoj.

La esperantistoj el la distrikto de Stara Zagora decidis anonci konkuradon al la Esperanto-societoj el ĉiuj distriktoj de la lando dum 1963 pri la jenaj punktoj:

1) Procento de plenumo de la kontrolaj ciferoj por membroj de BEA en la distriktoj, laŭ la plano de CK de BEA.

2) Procento de abonantoj de „Bulgara Esperantisto“ en la distriktoj, sur bazo — 70% de la membraro.

3) Kvanto de senditaj al kaj ricevitaj de ali-lando kolektivaj leteroj dum 1963 en proporcio kun la nombro de la societoj en la distrikto.

## TRA LA GAZETARO

En ĵurnalo „Večerni novini“, Sofio (30. X. 1962) — anonco, ke Esperantista societo „Autotransporto“ organizas sasonatajn kursojn esperantan por komencantoj kaj progresintoj. La sama anonco aperis en la sama ĵurnalo de 3. XI. 1962.

En ĵurnalo „Rabotničesko delo“, Sofio (13. I. 1963) en la artikolo „Inter la plej popularaj“ la aŭtorino E. Ivanova skribas ke en apartaj eldonoj la verkoj de Aleko Konstantinov aperis en ukraina, greka, turka, albana kaj en Esperanto.

En ĵurnalo „Otečestven zov“, Vraca (16. II. 1963) aperis longa artikolo de Iv. Borisov titolita „Aŭ laŭ la internacia junulara Esperanto-kongreso. Ni renkontos delegitojn de la tuta mondo“.

En ĵurnalo „Ĉapavski zov“, vil. Belovo, reg. de Pazarĝik (26. II. 1963) aperis longa artikolo de Veska Duneva „Lernu Esperanton“. Inter alie ŝi rakontas pri la 48-a Universala Kongreso de Esperanto en Sofio kaj la 19-a Internacia Junulara Kongreso de Esperanto en Vraca, pri la utiloj de Esperanto kaj pri la lernado de la lingvo en kursoj. Ŝi mem lernis la lingvon en korespondanta kurso kaj pere de Esperanto vizitis multajn landojn kaj kongresojn.

## NEKROLOGO

La 2-an de marto 1963 mortis la malnova Esperanto-pioniro, membro de Esperantista societo en Pleven dum multaj jaroj inĝ. **Konstantin Ivanov Pečigarov.**

Niajn kondolencojn al la funebra familia.

## FONDUSO CENTRA ESPERANTO-DOMO

Se vi estas amiko fidela  
kaj adepto de la lingvo bela,  
de nia kara aminda Esperanto,  
vi tuj per via briko necesega  
faŭigos vera majstro-konstruanto  
de Centra Esperanto Domo hela  
en Sofio — nia ĉefurbo beleaga!

|                                |           |                               |          |
|--------------------------------|-----------|-------------------------------|----------|
| Virina rondo — Sofio           | 43.— lv.  | Esperanto s-to — Svištov      | 7.50 lv. |
| Velika Gačeva — Sofio          | 7.40 lv.  | Stojan P. Kârtev — vil. Cala- |          |
| Poŝtista s-to — Sofio          | 24.40 lv. | pica                          | 2.20 lv. |
| Studenta s-to — Sofio          | 13.80 lv. | Ivan Ŝojkov — vil. Ugârĉin,   |          |
| Esperanto s-to — Nova Zagora   |           | Loveŝ.                        | 2.80 lv. |
|                                | 108.— lv. | Ivan Rajĉev                   | 5.— lv.  |
| Esperanto s-to — Stara Zagora  |           | Danail Iv. Danailov           | 2.56 lv. |
|                                | 313.— lv. | Jean Thomas — Francio         | 25 — lv. |
| Esperanto s-to — Velingrad     | 43.— lv.  | Hristo Gorov — Sofio          | 15 — lv. |
| Esperanto s-to — vil. Ŝatrovo  | 50.— lv.  | Violin Oljanov — Sofio        | 21 — lv. |
| Georgi Kaŝukeev — vil. Ŝatrovo |           |                               |          |
|                                | 25.— lv.  |                               |          |
| Esperanto s-to — Tolbuhin      | 30.— lv.  |                               |          |
| Esperanto s-to — Blagoevgrad   | 30.— lv.  |                               |          |
| Esperanto s-to — Gabrovo       | 14.— lv.  |                               |          |
| Esperanto s-to — Sevlievo      | 53.— lv.  |                               |          |
| Esperanto s-to — Ruse          | 50.— lv.  |                               |          |
| M. Penkov — Mihajlovgrad       | 25.20 lv. |                               |          |
| Esp. s-to — S. Dimitrov        | 19.46 lv. |                               |          |
| El diversaj                    | 32 50 lv. |                               |          |

*Je memoro de sia filo Hristo M. Conkovski, pereinta en la batalo kontraŭ faŝismo, Minko M. Conkovski el Trojan sendis 50 levojn, kiel kontribuon por konstruo de „Esperanto-domo en Sofio“.*

*Iuj gekamaradoj plendas al ni, ke ili ne ricevas regule nian gazeton „Bulgara Esperantisto“. Efektive REP malfruiĝis la ekspedadon de la 1-a numero per 21 tagoj kaj de la 3-a numero per du semajnoj. Sed pri tio la redakcio neniel kulpas. Ni petas la abonantojn kaj la societojn ĉe okazoj de neregula ricevo sin turni al la lokaj poŝtejoj aŭ al Ministerstvo na transporta i saobŝtenijata, ot del „Poŝtenski saobŝtenija“ — Sofia.*

Въпреки няколкократните напомняния, някои дружества и отделни активисти още държат суми от фонд „Постройка есперантски дом“ в себе си. ЦК на БЕС за последен път апелира сумите веднага да се отчетат като се изпратят в БИБ, Софийски клон, под наименование фонд „Постройка есперантски дом“. Останалите непласирани кочани също така трябва веднага да се върнат на секретаря на строителния комитет *др. Михаил Петров, ул. Цар Борис 8, София*, който при получаването им ще върне разписката.

Невърнатите кочани смарки-тухли до края на м. май т. г. ще се считат за пласирани и тяхната стойност — дължима.

## KUTIMOJ DE LA FAMAJ HOMOJ

Kiel laboris la grandaj verkistoj?

Kelkfoje ili havis strangajn kutimojn, preskaŭ maniojn. Kaj neniam ili strebis ilin forigi.

Balzak (Balzac) posedis grandegan laborkapablecon. Post vespermango li ĉiam kuŝiĝis je la sesa vespere por leviĝi ĝuste je la noktmezo. Kaj dum la tuta Parizo ripozis, li laboris. Li verkadis senĉese ĝis la 12-a de la sekvanta tago. Aliflanke li trinkis multe da kafo, kiun li mem preparis. La kafo ekscitis lin, subtenante lian organismon vigla. Samtempe ĝi ruinigis. Oni kalkulis ke Balzak eltrinkis pli ol 50,000 glasojn da kafo dum sia vivo.

La skribitajn foliojn li sendis al la presejo sen ilin legi. Poste li faris ĝeneralajn korektojn sur la larĝaj margenoj de la kolumnoj ĉe la unua kaj la dua korektaĵo.

Flober (Flaubert) laboris tro malrapide. Longe li pensis, forstrekis, plenskribis la margenon de la manuskripto. . . El 20 paĝoj li elektis nur unu. Li deklamis ĉiun skribitan frazon laŭtvoĉe por ke li eksentu la ritmon kaj la belsonecon de sia parolo.

Viktor Jugo (Victor Hugo) ĉiam leviĝis je la kvina matene kaj verkis starante apud la alta skribtablo ĉe la fenestro.

Aleksandro Djuma (Alexandre Dumas) — patro dum laboro ĉiam trinkis limonadon.

Dikens ĉiumatene skribis severe difinitan nombron da paĝoj: tri.

Musset dum la tago mallevis la kurtenojn de la fenestroj, eklumigis la kandelojn kaj komencis verki.

Pol Verlen (Paul Verlaine) kaj Hofman (Hofmann) tro uzis alkoholon. Ili finis sian malfeliĉan vivon tre frue.

Jorĝ Zand (Georges Sand) senĉese fumis. Sen cigaredo ŝi povis skribi eĉ ne unu linion.

L. Zamenhof estis granda humanisto kaj pacifisto, sed pasia fumanto. Kiam amikoj lin admonis forlasi la fumadon li respondis: „Preferinde vivi pli mallonge, sed esti utila al la socio, kreante internacian lingvon“.

Kompilis : N. Nanov

### *Por la novuloj*

## LA OMBRO DE LA AZENO

Iun tagon, kiam de la alto de la tribuno Demosteno provis altiri la atenton de la atena popolo al gravaj demandoj, li ne sukcesis. Tiam li ekhavis la ideon komenci la sekvantan rakonton:

Junulo luis azenon por iri de Ateno al Megaro. Estis varmega somera tago. Ĉirkaŭ tagmezo, kiam la suno brilis per sia plena forto, la mastro de la azeno kaj la vojaĝanto haltis kaj komencis disputi: kiu el ambaŭ devas profiti la ombron. Kiun donis la korpo de la besto.

— Mi luigis al vi mian azenon kaj ne ĝian ombron, diris la unua.

— Ne, kon raŭdiris la alia, mi faris negocon pri la tuta besto.

En tiu momento Demosteno rompis sian rakonton kaj la amaso, vive interesita, postulis per laŭtaj krioj la daŭrigon kaj la finon de la historio.

— Nu, kio! — ekkriis tiam Demosteno, — la ombro de la azeno interesas vin tiagrade kaj kiam mi parolas al vi pri viaj plej karaj interesoj, vi apenaŭ konsentas min aŭskulti!

La atenananoj komprenis la lecionon, sed ili neniam eksciis la finon de la historioto.

## SENTALENTA MUZIKANTO

Elstara greka civitano invitis al tagmanĝo siajn amikojn. Inter ili estis ankaŭ Diogeno. Dum la tagmanĝo sentalenta muzikanto ludis arfon. La gastoj estis ne kontentaj kaj enuis. Diogeno tamen esprimis sin flate pri la muzikanto laŭdante lin.

Ĉu vi ne komprenas, ke li estas malbona muzikisto? — diris unu gasto. — Kial vi lin laŭdas?

Mi laŭdas lin, — diris Diogeno, — ĉar, kvankam sentalenta, li ne iras ŝteli, sed daŭrigas la muzikadon.

## THE INTERNATIONAL LANGUAGE REVIEW

estas la titolo de kvaronjara stencilita revuo redaktata en angla lingvo kaj en artefaritaj lingvosistemoj Esperanto, Ido, Occidental, Interlingua k.a. Ĝi aperigas artikolojn pri la teorio kaj pri la konkretaj faktoj de internacilingva movado. En n-ro 28 de julio—septembro 1962 ĝi aperigis artikolon de Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario de UEA. La revuo havas legantojn en 50 landoj precipe Ĵingvistoj kaj studentoj filologoj. Ĵara abonkoto — 2,50 usonaj dolaroj sendenda al la eldonisto kaj publicisto Floyd Hardin P. O. Box 393, Denver 1, USA.

## POR LA MONTO-DOMO „ESPERANTO“

Kun plezuro ni informas, ke la fakdelegitoj pri alpinismo

Hans Wankmuler el Munkeno kaj Hristo Paškulev el Karlovo denove helpis la konstruadon de la esperantista montodomo, donante po 10 levoj. Entute ĝis nun ili kontribuis per 40 levoj. Nian koran dankon. Ni esperas, ke baldaŭ ili eniros en la kategorion „Fondintoj de la Montodomo“.

Familio Paulette kaj Georges Broutin el Francio sendis tri librojn por la montodoma biblioteko. Dankon!

Pluraj enlandaj kaj eksterlandaj gesamideanoj kaj esperanto-societoj pruvigis sian fidelecon al la movado, helpante la starigon kaj la funkciigon de la unika esperantista montodomo. Ĉu, kara leganto, ankaŭ vi estas inter ili? La movado bezonas nian apogon. Tuj kontribuu al la fonduso!

Turista Sekcio „Esperanto“  
poŝtkesio 44, Sofio

## HOMO KAJ KOSMO

estas la nomo de la nova naturscienca revuo en esp-o. Ĝin eldonas la Astronomia Observatorio en Zagreb, pri kiu, konfidente oni diras, ke estas en la manoj de esperantistoj. La eldona instituciojamas per si mem estas sufiĉa garantio pri la kvalito de la revuo. Kaj vere, unu rigardo sur la aperinta kajero konfirmas tiun supozon. Multaj artikoloj,

populare verkitaj en modela esp-o konigas al la leganto la lastajn atingojn de la homo en la sferoj de la naturo, scienco kaj tekniko.

La gazeto aperos kvarfoje en la jaro kaj la prezo por unujara abono estas 1.50 levoj. Bulgaraj s-anoj povas sendi la sumon al k-do Metodi Panĉev, Sofia 7, Str. Persenk № 30.



## DEZIRAS KORESPONDI

### USSR

Kolker Danielo, Zaporozje 2, ul. Ŝteznodorojna — 4, kv. 9, Ukrainio. Se ŝi el tutmondaj ĝesamideanoj turisme gastas en Zaporozje, ne forgesu viziti la regionan historian muzeon, kie oni ricevos esperantajn klarigojn.

Komencantaj ĝesperantistoj el rondeto „Verda Stelo“ (20—25 jaraĝaj) deziras korespondi kun ĉi pri ĉi. Interŝanĝas PI, fotojn, gramfon-diskojn. Skribu al: „Verda Stelo“, Kiselev I. A., 1 Krasnij pereuk 9, Tula.

Andrej Sidorov, ul. B. Ĥmelnickogo 10, Ĉerkask obl. — petas sendi informojn pri historiaj faktoj de batalo kontraŭ tabakfumado.

Bagramov Anatolo (18-jara), Tbilisi 13, 10-j gorodok 15.

Portnov Vasilio (17-jara), Tbilisi, Saumjana 63. Eŭgenij Steŝenko, Moskva A — 287, do vestrebovani a — 25-jara instruisto deziras serioze korespondi kun ĉi pri ĉi. Interŝanĝas PI, PM, E-librojn, E-insignojn, E-aĵojn.

23-jari samideanoj interesigas pri PI, PM, fotoj, E-libroj; D mo N. G. Ĉ. 32, kv. 18, urbo Djambulo, Kazah. SSR.

### BULGARIO

Ivan Dimitrov Roĝev, ul. Petropavlovskaja 86, Vraca.

### ITALIO

Esperanto-grupo (18—25 jaraĝaj) de Catania ĉe Gioventu Italiana, Via Plebiscito N° 784 Catania, Sicilia — kun ĝejnuloj el diversaj landoj.

### OKCIDENTA GERMANIO

Nora Hartwich, Krönerstr. II, 6 Frankfurt/Main (32-jara fraŭlino) serĉas seriozan korespondadon kun sperta esperantisto el Sofio (aŭ Bulgario). Interŝoj pri popolmuziko, fil lora kaj interŝanĝo de diskoj. Partoprenos la 48-an UK.

### BELGIO

Fino Leibovitch G'oria, 55 Consciencestraat, Antwerpen kun bulgara ĝesamideanoj (25—35 jaraĝaj). Ne pre partoprenos la 48-an UK.

### JUGOSLAVIO

Reciprokaj vizitoj Beograd--Sofia. 18-jara lernanto de gimnazio deziras korespondi kun ĝejnuloj el Sofia pri la kongreso kaj pri eventualaj reciprokaj vizitoj dum la Internacia Konferenco de la lernejoj en kiuj Esperanto estas instruata (Beograd, 28. VII—1. VIII) respektive dum la Universala Kongreso en Sofia. Adreso: Duro Obradović, Narodnog fronta 15, Beograd.

Viktor Skukan, Komuna Binko Pakrac — interŝanĝas PM pri floroj, sporto, artistoj, verkoj, belulinoj.

### BRAZILIO

Gabriel Dias Oliveira (19 jara fraŭlo), Rua Jaboatao, 14-Campo Grande, GB, Rio de Janeiro.

Ines Mazzoleni (13 jara knabino), Rua Taquarembó, 63-Campo Grande, GB, Rio de Janeiro.

Laura Jane Rosa Viviani (21 jara f-ino), Rua 12 Feveteiro, 961-Bangu, GB, Rio de Janeiro.

Lea Maria Cruz (26 jara f-ino), Rua Alente. Justino Proenca, 414 Campo Grande, GB, Rio de Janeiro.

Maria Odete Gomes da Silva (19 jara f-ino), Estr. Paciência, 430 Paciência, GB, Rio de Janeiro.

Marly Correa da Cruz (26 jara s-ino), Rua Jaboatao, 14 Campo Grande, GB, Rio de Janeiro.

Teresinha Maria Pereira (20 jara f-ino), Rua Alente. Grenfell 164-Campo Grande, GB, Rio de Janeiro.

Sergio Roberto Silva (18 jara fraŭlo), Rua Vitor Alves, 96-Campo Grande, GB, Rio de Janeiro.

Lecir Silva (16 jara f-ino), Rua Herculanio Junior, 5-Augusto Vasconcelos, GB, Rio de Janeiro.

---

**Ĉefredaktoro:** Violin OLJANOV

**Redakta komitato:** Kiril DRAŤEV, Atanas LAKOV, Canko MURGIN (vicĉefredaktoro)  
Ivan SARAFOV, Simeon SIMEONOV.

Korektis: Vasilka Petrova

Adreso de la redakcio: Sofio, poŝtkesto 66. Tel. 3-26-82

**A C E T U !****L E G U !**

Malnovaj ekzempleroj de „Bulgara Esperantis'o“

|                                                                                     |                   |
|-------------------------------------------------------------------------------------|-------------------|
| 1958 jaro — 1 — 10 numeroj, binditaj . . .                                          | 1.00 lv.          |
| 1959 jaro — 2 — 12 numeroj . . . . .                                                | 0.05 lv. por ekz. |
| 1960 jaro — 1 — 12 numeroj . . . . .                                                | 0.05 lv.          |
| 1961 jaro — 1 — 12 numeroj . . . . .                                                | 0.10 lv. por ekz. |
| Gazeto „Esperanto“ (bulgarlingva) . . .                                             | 0.04 lv.          |
| Gazeto „Zamenhof“ . . . . .                                                         | 0.04 lv. por ekz. |
| Diplomoj por finita kurso . . . . .                                                 | 0.05 lv.          |
| „La lernejo kaj Esperanto“ (bulgarlingva). .                                        | 0.10 lv.          |
| „La mondo havas internacian lingvon“ de<br>Sarafov-Masárov (bulgarlingva) . . . . . | 0.50 lv.          |
| „Amika Vjetnamio“ . . . . .                                                         | 0.70 lv.          |
| „Sub ta jugo“ de Ivan Vazov (bindita) . .                                           | 1.73 lv.          |
| Portreto „Zamenhof“ . . . . .                                                       | 0.10 lv.          |
| Membro-karto . . . . .                                                              | 0.10 lv.          |
| Statuto . . . . .                                                                   | 0.10 lv.          |

Gekamaradoj, faru viajn mendojn al Bulgara  
Esperantista Asocio p. k. 66, Sofio.